aparte gravas por aziaj intelektuloj?”. Katalin Kováts donis provlecionon. Anoj de Nederlanda Esperanto-Junularo plenigis la lastan horon. Jonny M (Germanio) faris bonan koncerton. Multaj junaj homoj ekdancis.

Dimanĉe ni invitis ĉiujn partopreni urban promenadon, kiun gvidis oficiala urba gvidisto Marcel. Dmitri lerte tradukis al Esperanto. Poste ĉiuj kaftrinkantoj kaj manĝantoj en MeM povis aŭskulti pri la avantaĝoj uzi Esperanton dum vojaĝoj, pri Pasporta Servo, pri Amikumu. Fine estis Kun-Kant-Kanonado kun *Kajto*. Ĉiuj, kiuj emas kanti, povis kunkanti. Kantante ni transdonis la stafeton al la rusoj, ja post la Esperanta Semajno en Leeuwarden komenciĝis la Rusa Semajno.

Ineke Emmelkamp

PS. Mi nun okupiĝas pri organizado de studsemajnfino en oktobro. Du vizitintoj de “Lando de lingvo” ĉeestos la kurson de Esperanto por komencantoj.

Denove en la Ĉeĥa Paradizo

De la 19a ĝis la 23a de septembo en la Ĉeĥa Paradizo okazis la 48a seminario de la “seniora grupo“ de fidelaj amikoj de la penziono *Espero* – Rondeto de doktoro Jozefo Hradil. Li bedaŭrinde forpasis en la jaro 2008 aŭtune.

La matena gimnastiko antaŭ la matenmanĝo havis aspekton Esperanto-jogan. La antaŭtagmeza konversaciado kaj instruado povis okazi subĉiele en amika rondo. Ni utiligis la novaperintan libron *Legaĵoj kun verda birdo*. Valora estis prelego de samideano Kazdera el la urbo Liberec pri “Interhelpo“. Ni promesis lian prelegon ciferecigi kaj publikigi.

Aliaj prelegoj okazis ankaŭ vespere kaj enhavis utilajn informojn por novaj adeptoj, ekzemple, kiel funkcias Esperantaj asocioj, rakontadoj pri travivaĵoj dum kongresoj, pri la historio de la vilaĝo Skokovy, kiu troviĝas en la distrikto Mladá Boleslav, aŭskultado de la muziko de la grupo *No Problem / Senprobleme* ktp. Interesaj estis manlaboroj, kiujn gvidis okjara nepino de Eva Pánková por siaj “avinoj”.

Jindřiška Drahotová